

EKLEZIO KAJ JUSTECO

(Piero Ghebbo kaj Ernesto Toado, italaj sociologoj)

La dokumento de la episkopa Sinodo pri la justeco trovis multajn konsentojn sed ankaŭ malkonfidon kaj seniluzion. Tiu sento de malkonfido ne ŝajnas al ni justa. Ni ne volas defendi la Sinodon ĉiukaze kaj blinde; eĉ ni kritikis la unuan parton de la dokumento, kiu ŝajnas al ni nekompleta kaj iomete konfuza. Sed la aliaj partoj estas altvaloraj kaj modernaj: ili akcentas tre kuraĝe la taskojn de la Eklezio en mondo regata de egoismo kaj malriĉeco. Multaj estis seniluziigitaj ĉar ili atendis de la Sinodo sociologian ekzamenon de la maljustaĵoj en la mondo aŭ politikajn poziciprenojn, sed la sinodaj Patroj volis pritrakti la temon de la justeco nur laŭ religia kaj eklezia vidpunkto. Al ni ŝajnas ke tio estas antaŭenpaŝo kompare kun la antaŭaj dokumentoj koncilaj kaj papaj.

En la unua parto la dokumento ekzamenas la nunan situacion de la mondo koncerne justecon kaj evoluon. La Patroj rimarkas du kontraŭajn fenomenojn: unuflanke la marŝon de la mondo sur la vojo al la unueco de la scienco kaj de la ekonomio kaj al la praktika akcepto de la plena fundamenta egaleco kaj de la persona digneco de ĉiuj homoj.

Aliflanke oni rimarkas, ke la dividfortoj kaj antagonismoj ŝajnas ĉiam kreski; krom la malnovaj dividoj kaj kontraŭstaroj inter nacioj, gentoj kaj klasoj, kiuj esprimiĝas per rapida kurado al armiloj, la nova industria kaj teknologia ordo mem favoras la koncentriĝon de la riĉaĵoj, de la povo, de la decidkapableco en la manoj de malgrandaj grupoj publikaj aŭ privataj.

Tiel multaj homoj ne povas atingi siajn fundamentajn rajtojn homajn kaj civilajn.

La denunco de la maljustaĵoj en la unua parto de la dokumento estas deva kaj justa. Oni devas tamen rimarki, ke la Sinodo volis denunci la maljustaĵojn havantajn tutmondan karakteron. Oni legas en la teksto: « La Sinodo havas universalan karakteron kaj pritraktas la problemojn de la justeco koncernantajn la tutan homaron ». Fortaj kritikoj estis adresitaj al la Patroj flanke de multaj gazetoj, ĉar oni opiniis, ke ili ne kuraĝis denunci malimplicite konkretajn kazojn de maljusteco, ekzemple la portugalan koloniismon, la sudafrikan rasismon, la militon en Vietnamo, la sudamerikajn diktaturojn ktp. Sed oni devas noti, ke tiaj denuncoj estus praktike sen efiko sen profunda analizo de lokaj situacioj kaj

sen disvolviĝo per precizaj akuzoj; sed tio ne estas ebla al universala kunveno kiel estas la Sinodo.

Ĝi konfidis la ekzamenon kaj la denuncon de la konkretaj kazoj al la naciaj eklezioj. Due: se la Sinodo estus volinta denunci la unuopajn kazojn de maljusteco, ĝi ne estus povinta limiĝi je tri — kvar kazoj, sed citi ĉiujn kazojn kun samaj karakteroj. Estus juste kondamni la sudafrikan kaj rodezian rasismon, sed kial ne ankaŭ aliajn evidentajn kazojn de rasismo en la arabaj landoj kontraŭ la hebreoj, en Israelo kontraŭ la araboj, en Hindujo kontraŭ homoj ekster la kastoj, en Birmanujo kontraŭ la tribaj loĝantaroj, en pluraj landoj kontraŭ malplimultaj triboj, en Usono kontraŭ la niguloj, en eŭropaj landoj kontraŭ emigrintoj? Oni proponis al la Sinodo la kondamnon de la diktatura subpremo en Brazilo, Portugalujo kaj Greklando. Sed tio ne havus signifon, se oni ne kondamnsu ankaŭ aliajn diktaturojn: de Ruslando kaj Ĉinio ĝis la lastaj tiranetoj de la subevoluinta mondo.

Ni ne konsentas kun la sinoda dokumento, kiam ĝi ŝajnas identigi justecon kaj evoluon, maljustecon kaj subevoluan.

Ekz. se Afganistano restis fermita al la moderna mondo, tio estas negativa konsekvenco de ĝia geografia izoleco, de ĝiaj historio, kulturo kaj teokrata reĝimo. Tiel la socian ordigon de la kastoj en Hindujo oni devas atribui al la maljusteco de aliaj popoloj. Se tri kvaronoj de la homaro malsatas, tio ne estas nur kulpo de riĉaj landoj, de maljustaj sistemoj, de homa egoismo: ludas gravan rolon ankaŭ aliaj faktoroj: historiaj, kulturaj, sociaj, religiaj, geografiaj...

Antaŭ malmultaj monatoj Nyerere diris: « Ni ĉesu atribui al la koloniismo ĉiujn kulpojn de niaj malbonoj, kiel se ni ne havus la respondecon de nia pasinteco kaj de nia estanteco. La konstruatoj de nia estonteco estas ni mem: ni kaj nia peza laboro konstruas nian bonstaton ».

La tiel nomata tria mondo povos leviĝi, kiam ĝi estos konscia pri siaj grandegaj eblecoj.

Cetere la Sinodo diris: « La malriĉaj landoj prenu en siajn manojn sian estontecon celante sian progreson, ĉar tiamaniere ili esprimos aŭtentike sian distingantan karakteron; tiucele estas necesa iom da respondeca naciismo ».

(Traduko de la redaktoro - Sekvos aliaj komentarioj).

-
- * La mondo apartenas al tiu, kiu donos al ĝi plej grandajn esperojn. **(Quoist)**
 - * Se ĉiu ricevus kion meritas, kiu estus sekura kontraŭ bastonadoj? **(Shakespeare)**
 - * Ĉiu sin gardas manĝi aĉigitan nutraĵon, sed multaj nutras sin per aĉigitaj pensoj senhezite **(Guardini)**
 - * Sufero estas vekilo de animo **(Zola)**

ESPERANTISTOJ ESPERIGAS ESPERANTOJN (II)

Kelkfoje kontribuantoj al Agado E3 petas min, ke mi de tempo al tempo konigu la staton de la afero. Volonte mi plenumas ĉi tiun peton, esperante ke ĝi inspiras al helpo ankaŭ tiujn, kiuj ĝis nun neniel reagis. Sub la moto « okulon pro okulo » (celo: okulkuracaj instrumentoj por okulkuracistoj, kiuj laboras en Orienta Afriko) mi ricevis ĝis Pasko inkluzive jenajn mondonacojn:

Aŭstralio: D.McQ. en W. 22.50; *Ĉeĥoslovakio:* B. G. en N. 85; *Finnlando:* T.T. en J. 2.25; *Francujo:* H. S. en P. A. 11.97, E.Tn. en St. E. 6.18; *Germanujo:* A.K. en S. 9.96; E. J. en L. 49.83; G.R. en B. 5.97; *Nederlando:* J.T. en H. 1.000; G.W.J.D. en H. 10.; E.S.O. en H. 5.; J.M.v.d.L. en A. 2.50, G.B. en L. 25.; J. de V. en L. 25.; C. D. en H. 8.; K.R. en A. 25.; M.v. L. en L. 5.; Esp. Rondo en A. 60.; H.D.W. en H. 10.; J.Th.P. en U. 5.; G. J.K. en H. 10.; D.E. 50.; H.B.B. en W. 7,50, W.K. en W. 10.; T.B. en N. 6.; J.C. en R. 10.; L.H.B. en V. 5.; Y.W. en G. 10.; J.v.T. en H. 5.; T.E.v.P. en A. 11.; *Svedujo:* Stokholmaj esperantistoj « Esto » 992.72; poŝtmarkoj, bildkartoj, k.t.p. 60. — Fina sumo: ned guld. 2.551.38. Mankas ankoraŭ: ned. guld. 17.450. Koran antaŭdankon pro via helpo!

*Jacques Tuinder, Jan Ligthartstraat 39,
Heemskerk, Nederlando, ĝirkonto 1020100*

LEGANTOJ SKRIBAS

B. Grim (Ĉeĥoslovakio):

Est. s-ro, pri pornografio mi pensas, ke la registaroj havas rajton kaj devon batali kontraŭ ĝi, ĉar ĝi detruas la socion kaj estas antaŭludo de aliaj malbonoj. Mi preferas laŭeble eĉ ne paroli pri ĝi multe en EK, ĉar tio aĉigas la atmosferon, kiun spiras eĉ ĉastuloj. Ni penu savi kion ni povas, kaj same faru ankaŭ la registaroj, kies tasko ne estas bankedi, sed servi al la homoj, plifaciligi ilian iron antaŭen...

W. Mudrak (Aŭstrujo):

Kun atento kaj konsento mi legis la diversajn skribaĵojn senditajn de prof-ino Corry Van Kleef, precipe kion ŝi skribis pri la morala danĝero de militservo. Mi kontraŭas devigan militservon, kies forigon papo Benedikto 15-a proponis en sia porpaca mesaĝo en aŭgusto 1917. La Koncilo cetere ja esprimis ankaŭ konsideron de la rifuzantoj pro konsciencaj kaŭzoj.

INFANOJ

Mia lernejo jam similas al la zumanta abelujo. La pastro publikigis kaj la servisto de la vilaĝo anoncis tamburante, ke post tempokolektado neniu retenu hejme sian infanon, sed sendu ilin en la lernejon.

Do jam lunde komenciĝis la enmarŝado. La malgranda, pintanaza Joĉjo Tabi venis unua. Li venis kurante, ĉar tiu ĉi knabo ĉiam kuras. Lia tolsako puŝiĝis tien kaj reen ĉe lia flanko, ĉar ĝi estis plenŝtopita. Jen, unu granda cidonio eĉ falis el ĝi, kiam li transsaltis la fosajon antaŭ la lernejo.

Ankaŭ la aliaj baldaŭ aperis. De ĉiu flanko de la vilaĝo venadis knaboj kun grandaj tolsakoj, knabinetoj en ruĝaj tukoj. La ligna anso ripete klakis sur la strata pordo, kaj en la korto jam multaj infanvoĉoj laudis Jesuon Kriston**. Iun kaj alian mi jam rekonas pri liaj paŝoj. Unu paŝo, unu

frapo, unu paŝo, unu frapo: tiu ĉi estas la lama Gál-infano. Sed jen, li haltas.

— Ci — mi aŭdas lian voĉon —, ĉu mia vizaĝo estas inkomakula?

— Vere ĝi estas — respondas eĉ du infanvoĉoj.

— Kie?

— Ĉe via nazmalsupro.

— Kie?

— Jen, nu!

Verŝajne pri plumo penadis hejme la bona knabo, kaj la plumo estas tiel malica varo, ke ĝi aŭ ŝprucas, aŭ fluas, sed faru kion ajn per ĝi, ĝi nigrigas ion.

La aliaj infanoj eksterordinare lavite sidas en la benkoj. Ankaŭ la pansakoj estas blankaj. Pomodoro flirtadas en la lernejo.

Mi povas aŭdi la lukton de iu patrino antaŭ la pordo. La edzino de Vas alvenigas sian Rozinjon.

* Géza Gárdonyi (1863-1922), kies belega romano, la « Sklavoj de Dio », baldaŭ aperos en la komuna prizorgo de la hungara kaj itala esperantistaroj, estis ne nur unu el la plej eminentaj, hungaraj, historiaj romanverkistoj, sed same akklamata kaj rekonata, kiel novelisto.

Komence de sia kariero, estinte vilaĝa instruisto, nature, lia atento kaj amo turniĝis al la popolo kaj estis ĝia fidela kaj amanta advokato, precipe en siaj multnombraj noveloj.

En siaj noveloj li prezentas al ni la kamparan vivon je la fino de la pasinta jarcento. Tiu vivo estis peza, zorgoplena, ofte tre malriĉa por la filo de la tero, sed ĝi havis ankaŭ sian belon, valoron. Legante Gárdonyi-n ni rekonas, ke krom la nuntempe adorataj, materiaj valoroj ekzistas kaj restas ankaŭ eternaj valoroj: la simpleco, modesteco kaj humila bonvolo!

** « Estu laŭdata Jesuo Kristo! » — iama, ĉefa, kampula saluto.

La etulino nun venas la unuan fofon en la lernejon. Ve, kia timiga loko estas la lernejo! Ĉu mi estas timiga? Ne, ŝi ja konas min: somere, sub la salikoj ŝi kantis multfoje al mi. La loko mem estas timiga, de kie devenas leĝoj por infanoj kaj mirindaj scioj en la vilaĝon. Mem la loko estas timiga. La pli maljunaj infanoj eĉ akcentas ĝian specialan signifon. Kaj la malgranduloj aŭdas la parolojn. Dio scias, kion ili imagas per sia malgranda prudento. La aboco, la kajero, la katekismo, la leciono — ĉiuj ĉi estas misteraj vortoj, kaj ĉiuj venas de ĉi tie. Eble somere Rozinjo suprengrimpis foje eksterre al la fenestro kaj esplorrigardis enen. Huh! Kia terura loko! Plena de larĝaj benkoj! En la angulo ia du-pieda, nigra teruraĵo! Sur la muroj ĉiaspecaj paperoj kun nigraj signoj! Nu, malgranda Rozinjo sin kroĉas al la pordofosto. La etaj manoj kapablas teni per nekredebla forto.

— Ne, ne! — ŝi kries plorante — mi ne iras!

Ŝia patrino enportas ŝin ĉe la sino kaj starigas ŝin sur la plankon antaŭ mi. La infanaro kolon etendante priridas ŝin. Kaj la malgranda Rozinjo staras antaŭ la tablo, kun plorantaj okuloj, tremante. — Ŝi ne volis enveni — diras ŝia patrino spiregante —, neniam mi vidis tian!

— Kial vi timas, Rozinjo? — mi diras, en mian sinon prenante la blondan, blankvizaĝan knabineton — ĉu vi vidas, ke viaj aliaj kamaradoj kiel gajaj estas? Jen, ĉi tie

estas ankaŭ Joĉjo Tabi. Venu ĉi tien, Joĉjo!

Mi mansignas al la patrino, ke ŝi malaperu. Ŝi kaŝe foriras.

Knabo Joĉjo iom ruĝiĝas je mia alvoko kaj tuj estas apud Rozinjo. — Diru al Rozinjo, ĉu oni devas timi ĉi tie aŭ ne?

— Oni ne devas timi — respondas la knabo soldatmaniere, rigardante al miaj okuloj.

— Ne al mi diru, mia filo, mi ja ne timas, sed rigardu ĉi tien al Rozinjo kaj parolu al ŝi, kvazaŭ mi ne estus ĉi tie.

La knabo tiam kaptas la malgrandan, blu-musteran jaketon de Rozi kaj diras al ŝi:

— Kial ci timas? Ne timu, ci azeno!

Kaj delikate li levas la mentoneton de la malgranda knabino. La malgranda Rozi ekridetas al la knabo tra siaj larmoj.

Alvenas ankaŭ nia blinda almuzulo, la maljuna Pál Váróci. Kvazaŭ mi vidus la spiriton de la vintro mem proksimiĝi. Sed li ne envenas. Knabo Ábris sidigas lin apud la puton, sur la arbotrunkon. La maljunulo tie eksidas preskaŭ senmove; nur la venteto karesas, flirtigas kelkfoje lian hararon, lian barbon surbrusten ondantan. Lia vizaĝo ĉiam estas turnita al la fenestro. Li aŭskultas, kion oni povas aŭdi tie. Knabo Ábris tial kutimis respondi per krianta voĉo, ĉar li respondas ne nur al mi.

Tiam la maljunulo ankoraŭ pli alten levas sian kapon. Li aŭskultas kun tiritaj brovoj. Fine li forte kapjesas kaj ekridetas.

Mi kutimis havi tridek-kvardek instruatojn, sed nun ankoraŭ ili sidas maldense. Kelkaj el la plej grandaj nur tiam venas, kiam la vetero pli malboniĝas kaj oni povas malhavi ankaŭ iliajn diligentajn manojn.

Sed mia plej bona lernanto, la nigra-okula, nigra-hara knabo Istenes jam ĉi tie estas. Kun respektinda seriozeco li sidas sur la unua loko de la unua benko. Ĉi tiu estas lia loko jam de post tri jaroj. Se li mankas, ankaŭ tiam neniu kuraĝas okupi lian lokon. De ĉi tie li gardas la tutan lernejon, kvazaŭ kaporalo. Li estas, ĝis mia enveno, la sinjoro de la ordo kaj silento; li estas la respondeca gardanto de la kreto kaj de la lerneja sapo, la aranĝanto de la hejtado, ĉefministro por la preĝejo, la plej ĉefa spongo-malsekiganto, plankopureca-komisaro kaj juĝisto en malgrandaj procesoj. Vintre li estas ĉi tie la unua kaj li foriras la lasta. Dum mi ne estas ene oni nur frustrante licas paroli. Sur la benkoj rampadi, lukti aŭ batali en lia ĉeesto neeble. Legi kaj kalkuli kiel li, neniu scipovas. Lia patro estas fiero pri li. Somere, dum la tagmezaj ripozoj, vintre apud la bakforno, li elprovas sian filon per jam antaŭe pripensitaj ruzaj kalkuladoj. Kompreneble, tiuj kalkuloj estas plej ofte pri la artifikaj prezoj de la gren — kaj brutmerkatoj kaj pleje tial faritaj, ĉu oni povus trompi Imre aŭ ne? La okuloj de la tuta familio brilas, kiam Imre post ioma suprenrigardo al la plafon-traboj eltrovas

la deziratan nombron. Liaj patro kaj tie bofrato multfoje bezonis duontagon por elkalkuli tiujn per fabograjnoj. Imre bezonas nek fabon nek maizon: Li elfaras ĝin perkape dum minuto.

Se ne multe malpli respektinda estas ankaŭ la knabo Gál. La kompatinda estas lama, blonda, senkolora-vizaĝa, sed vigla-rigarda knabo. Lia malgranda, pelta jaketo neniam mankas el la lernejo. Li sidas ĉirkaŭ meze, por ke li povu esti proksime al ĉiu. Ĉar li estas la ĉefa krajon-pintiganto, tabulon-rektiganto, anserplumon-tranĉanto kaj krome li estas la majstro de la sambuk-ligna pafilo kaj de la turbo. Li scias plej bone kokokrii. Kaj la hundobojon li tiel fidele imitas, ke ĉiu hundo de la vilaĝo respondas al li. Ankaŭ lia skribo estas la plej bela. Sur la librojn kaj kajerojn de ĉiu infano nur li surskribas la nomojn.

Mi havas ankaŭ unu malgrandan, ciganan knabon: Li estas la Laĉjo de la Sárközi-familio. Brila, nigraokula, malgranda ido, la filo de nia sola cigana familio. Li lernas jam la duan jaron. Nature, la kompatindulo ne havas patron, sed lia avo same amas lin, kvazaŭ li havus. Kiomfoje la knabo skribas hejme, la cigano Sárközi ĉiam sidas apud li kaj almiras per siaj grandaj, nigraj okuloj la por li nekompreneblajn strangajn signojn.

— Nu, kio eŝtaŝ tiu ĉi? — li demandas la pipon elpreninte el la

buŝo, kiam la knabo finas la vicon.
La knabo legas:

— La hundo bojas. La kato miaŭas.

— Kiu eŝtaŝ la hundo?

La infano montras ĝin.

— Kiu eŝtaŝ la kato?

La infano montras ĝin.

La maljuna cigano nur rigardas, rigardas, kiel oni povas diveni la hundon kaj la katon el tiuj kur-
baj linioj, sed kompreneble, tio ne estas tiel facila, kiel la argil-
brikfarado. Tamen, kiam Laĉjo el-
kuras por ludi, li alvokas la edzi-
non kaj diras, montrante al la
kajero:

— Rigardu, kion scias Laĉjo: ĉi
tiu estas hundo, kaj tiu ĉi estas
kato.

Ciganan Laĉjon oni ŝatas en la ler-
nejo. Kiomfoje ili liberiĝas al la
korto, tuj vokas Laĉjon, por ke li
violonludu. Tiam li prenas du li-
gnopecetojn, « violonas » per ili
kaj samtempe ĉirpas al tio. Kelk-
foje ili ludas geedziĝfestenojn
dum la mallongaj paŭzoj.

Ankaŭ la blonda fileto de la bien-
posedanto estas tie ĉi, Dezsö. Mil-
da, malgranda, dika infano. Lia
prudento estas iom malrapida, sed
li estas afabla, kvieta kreaĵo. Li
estas granda admiranto de Imre
Istenes, kiun li opinias la plej
granda genio de la mondo. Li
ĉiam portas en sia poŝo pecon da
blanka pano. Li ŝanĝas ĝin por
bruna. Kiel bone esti kampulfilo!

La kampulido ĉiam ricevas hejme
brunan panon, povas porti lon-
gajn harojn kaj somere povas iri
nudpiede.

Apud Dezsö mi sidigis la petole-
man Bandi Tóth. Ĉi tiu estas pu-
gnogranda, rondvizaĝa knabo.
Ĉiam li havas en la poŝo ŝnure-
tojn, butonojn, gajlojn. Impeta,
kiel la ĉevalido, tamen pro la aliaj,
ĉirkaŭ li sidantaj, ŝafidsangaj in-
fanoj ankaŭ li devas trankvili.

Mi havas ankaŭ dek knabinetojn.
Ĉiuj estas modestaj kaj diligen-
taj. Ili ŝatas sin ornami, per floroj
dekori. Ankaŭ sur mian tablon
metas florojn foje iu, foje alia.
Strange, ke ĉie kaj en ĉiu aĝo
manifestiĝas en la virino la amo
al floroj, la zorgemo pri si kaj
atentemo kontraŭ aliaj.

Ne pli da lernantoj venas. Mi fer-
mas la grandan libron kaj tra-
rigardas la lernejon. Tiam ĉiuj
eksilentas. La okuloj de ĉiu infa-
no estas direktitaj al mi. Kiom da
bluaj, nigraj, brunaj okuloj! Kiel
puraj, fidindaj, honestaj okuloj!
Depost hodiaŭ ili estas ĉiuj miaj
infanoj. Iliaj animoj estas mia
blanka papero, kiun mi plenskri-
bos per la signoj de honestemo
kaj de la frataj sentoj, kiujn ĉiu
havu kontraŭ la alia!

Mi mansignas al ili, por ke ili sta-
riĝu. Ĉiuj leviĝas samtempe...

Elhungarigis: J. Hamvai

Auckland, Nov-Zelando, 1972

EKUMENAJ INFORMOJ

Pri la Eŭkaristio estis publikita grava dokumento katolika - anglikana, redaktita de la internacia teologia komisio en la angla Windsor Castle. La teksto entenas dekunu paragrafojn dividitajn en kvar partojn: enkondukon kaj tri ĉapitrojn: « La mistero de la Eŭkaristio », « La Eŭkaristio kaj la ofero de Kristo », « La ĉeesto de Kristo ».

En la enkonduko oni precizigas, ke la membroj de la Komisio (12 anglikanaj teologoj kaj 12 katolikaj teologoj) volis atingi profundan konon de la eŭkaristia realeco, fidelan al la Sankta Skribo kaj al la komuna tradicio. Komencante de la Skribo kaj de la Tradicio estis pli facile akordiĝi pri la du punktoj, kiuj estas la pilastroj de la deklaro: ofero kaj ĉeesto de Kristo.

* * *

Asimilo de Valoroj. La Eklezio dum la unuaj jarcentoj alprenis kaj asimilis multajn spiritajn kaj kulturajn valorojn de la Okcidento. Hodiaŭ ĝi havas kontakton similan kun religioj kaj kulturoj de aliaj partoj de la mondo kaj tio estas utila ne nur al tiuj popoloj, sed ankaŭ al la Eklezio mem, kiu per tia kontakto riĉiĝas. Ni esperas tutkore, ke ĝia sperto en la Oriento donos abundajn fruktojn.

* * *

Koncilo de Gejunuloj. Frato Roger Schulz, superulo de la komuno de Taizé, anoncis al la 16.000 gejunuloj kunvenintaj el multaj landoj la vesperon de Pasko, ke en la jaro 1974-a okazos tie la « Koncilo de la gejunuloj ». Tien alvenos kristanaj kaj nekristanaj gejunuloj Frato Roger (evangeliisto) diris al amikoj de sia komuno: « Dum la preparo de tiu ĉi koncilo ni riskis kaj riskas multe, sed oni ne devas maltrankvili kiam oni riskas pro grandaj problemoj. Mi multe konfidas al la intuicio de la gejunuloj, kiuj ĉi tie renkontiĝos, preĝos, serĉos, diskutos ». La nova reprezentanto de la movo ĉe la Sankta Sidejo estas frato Max.

-
- * Savi la mondon povas nur sanktuloj, aliaj vivas en songoj. **(Ilaĉi)**
 - * Bonfaru baldaŭ, ĉar poste povus al vi manki la tempo vi malgajnus. **(Don Bosco)**
 - * Interna paco estas plej valora havaĵo de homo. Aŭ homo ĝin havas kaj estas feliĉa, aŭ ĝin ne havas kaj ne estas feliĉa. Alia eblo ne ekzistas. **(Kojc)**
 - * Batalo por pli bona mondo estas batalo por amo **(Quoist)**
 - * La sufero estas plej rapida ĉevalo al Dio **(Duo)**
 - * Kristana unueco estas sen la papa ofico neimagebla **(Kilmer Myers)**

MUSULMANA VIDPUNKTO PRI ISLAM-KRISTANA DIALOGO

Profesoro Mohamed Talbi, docento ĉe la Beletra kaj Humanistaj Sciencoj Fakultato de la Universitato en Tunisi, prelegis, antaŭ nelonge, ĉe la Pontifika Instituto de Arabaj Studoj en Romo, pri la temo « Dialogo kaj Islam: Pripensoj rilate al aktuala temo ». Malgraŭ la pontoj jam de multjaroj ĵetitaj inter Romo kaj Islam, ankoraŭ la dialogo ne komencis. « 613 milionoj da katolikoj kaj 510 milionoj da musulmanoj ankoraŭ ne kapablas interparoli ». Tiu amara konstato portas la oratoron al klara ekzameno de la respondecoj de ĉiu dialoganto kaj al la esplorado de grand-valoraj indikoj pri la maniero kaj la dimensio de la dezirinda dialogo. Ĉeestis la konferencon, multnombre, altrangaj musulmanoj kaj kristanoj. Jen la resumo transdonita de la oratoro mem.

Nenio ekzistas en la musulmana revelacio kontraŭstaranta la kristanan dialogon, plie, estas versetoj, kiel la jena, stimulantaj al ĝi (Korano 29, 46): « Diskutu plej korekte kun la homoj pri la Libro... kaj diru: Ni kredas je tio, kio estis revelaciita al vi kaj nia Dio kaj la Via estas unu sola Dio kaj al Li ni ĉiuj estas submetitaj ».

Tiu verseto difinas la atmosferon de la dialogo kaj la kondiĉojn por ĝin antaŭirigi al pozitiva senco. Sed tiam oni sin demandas: kial, do, la dialogo ne progresis kaj ne evoluis tra la jarcentoj, kaj la miskomprenoj ne estis tuj klarigitaj? Ili devas serĉi la respondon en la disvolviĝado de la historio, kiu favoris la kverelojn kaj anstataŭigis per fortaj manieroj, tiujn de la diplomatio kaj de la sincereco. Hodiaŭ la dialogo, do, alvokas ĉiujn reveni al la vera spirito de la revelaciitaj religioj superante la dolorajn barojn de la pasinteco.

Malfacila dialogo

Ankaŭ la nuntempo havas sian malfacilaĵojn. La dialogo riskas la neblecon komenci pro manko de musulmanaj reprezentantoj nombraj kaj sufiĉe preparataj. Estas granda diverseco inter la dialogantoj. Hodiaŭ Islam diference de la kristaneco, komplete troviĝas je materiala kaj intelektuala vidpunkto, en la malfavorita tavolo de la subevoluo. Fronte al la nombraj kristanaj islamologoj ne estas eĉ unu — laŭ mia sciigo — musulmana kristologo je egala valoro. Tiuj malsimiloj, kvankam realaj ne devos esti trograndigitaj kaj estas ĝuste en la intereso de Islam ke ili estu superataj. Vere Islam ne havas elekton: se ĝi ne reprenas sian lokon

en la mondo kaj ne sin reenmetas en la historion pere de la dialogo, ĝi riskas komplete malsuperiĝi en mondo rapide sin transformanta.

Venkinte la malfacilaĵojn de la komenca evoluo, estas bezonate ankaŭ zorgi por ke la dialogo ne estu interrompata.

Estas necese, do, certigi al ĝi la plej, sukcese, bonajn kondiĉojn. Unue oni devas malhelpi la reviviĝon de la malnova polemika spirito eĉ sin prezentanta, eventuale, sub masko de dialogo. Ĉi tiu ne devas celi al la konvertiĝo kaj ne devas revigligi la interdisputojn, kiuj kontraŭstarigas la kredantojn inter ili.

Antaŭsupozoj por vera apostolado

Ne plu temas pri konkludo de anakronisma sankta interligo de faktkomplezaĵoj kaj strategiaj mezaranĝoj. Neniu kredanto devas renonci al la vero de siaj konvinkoj kaj ankaŭ ne al sia devo de apostolado, kiu fariĝas sen ia ajn polemika spirito, simpatia serĉesplorado kaj atesta komprenejo. Nur Dio povas penetrigi lumon en la korojn laŭ sia volo, nur Li povas rekoni la siajn.

Neniu kredanto rajtas anstataŭiĝi al Dio kaj kondamni poreterne sian proksimulon nur pro tio ke ĝi havas malsamajn religiajn konvinkojn. Tia konduto certe ne povas favori la dialogon sed malproksimigas la diversajn komunojn. Estas facile kompreneble, ke la Dia boneco povas ja venki la barilojn de la diversajn Eklezioj.

Pri Islam oni povas konsideri, ke tio korespondas al la penso de Ghazali (1058-1111), kiu estas rigardata de la plejmulto de la musulmanoj, kiel la ordoninda voĉtubo de Islam mem. Jen, ĉi rilate, tiu verseto: « Sed tiuj, kiuj kredas je Islam: judoj, kristanoj, sabeoj, te.e. ĉiuj, kiuj kredas je Dio kaj je la Lasta Tago kaj sintenas bone, havos sian premion ĉe la Sinjoro kaj ili nenion timos kaj neniam estos malĝojaj.

Tio, ĉi, laŭ la komento de Mohamed Abdou (1847-1905).

Kunkurado por la atingo de bonaj agoj

Nur en frata kaj malstreĉa atmosfero la dialogo eblas evolui profite al ĉiuj. Tiam oni povas libere starigi ĉiujn problemojn inkluzive tiujn de la sociala aŭ morala teologio, alian ajn modernan problemon eĉ komunan al ambaŭ religioj, kaj ankaŭ pritrakti la plej malfacilajn temojn pri la Krista naturo aŭ la Korano. Tiel la dialogo povas naski ĉiam fruktodonan atmosferon de intelektuala inciteco kaj plenumi la funkcion de profunda, saniga klarigo.

Ĉiel la eventualaj malsamceloj ne devas supermezure nin timigi. Ili sendube apartenas al Dia plano. « Al ĉiu estis asignita regulo kaj vojo. Kon-

kuru pri bonaj agoj kaj vi ciuj retroviĝos ĉe Dio. Tiam Li klarigos al vi la malsamojn, kiuj vin kontraŭmetas ».

Nun jen ni fronte al la nesondebla mistero de la homa kondiĉo kaj de la Dia Providenco. Se la dialogo nin stimulos al « konkurado al bonaj agoj » kaj nin puŝos superi nin mem, ĝi certe ne bankrotis kaj estos multobliginta en la mondo la eblecojn plivastigi la bonon.

(Tradukis Prof. N. Dell'Aringa)

MALFERMITA LETERO DE JUNA ITALA SACERDOTO **(el « La Cittadella »)**

Ĉi tiu mia pripenso ne devas esti konsiderata kiel juĝo al la konscienco de la unuopuloj ĉar nur Dio kapablas plenumi aŭtoritate tian enketon. Mi skribas pensante al ni kiel komuno de sacerdotoj senditaj de Kristo por servi ne al si mem sed al la aliaj.

Mia parolo — mi bone scias — ne apartenas al la plej kredindaj: tamen mi same parolas ĉar mi opinias, ke ofte ni interdiskutas maltrankvile pri kelkaj problemoj forgesante aŭ intence silentante, kion ni vere pensas. Mi plu ne estas kontenta pri mia aktuala maniero esti pastro. Jes, mi ankoraŭ kredas je la Sacerdoteco, donaco kaj nemeritita elekto de Dio, sed mi estas konvinkita, ke Jesuo Kristo certe ne aprobas tiun manieron laŭ kiu mi (kaj eble ni) ĝin ekzercas. Mi timas, ke ni estas mizere malriĉigantaj la donacon, kiun Dio konfide komisiis al ni: oni portas frukton nur se oni kuraĝas sin ĵeti en la manojn de la aliaj.

Jesuo Kristo diris: « Iru tra la tuta mondo ».

« Iru », sed kien ni estas irantaj? Jen ni, komplete senmovaj! Ni sentas nin tiel komfortaj kie ni troviĝas, ni ne volas malproksimiĝi de niaj propraĵoj, de ni mem, de niaj parokoj, de niaj grupoj aŭ asocioj: unuvorte de ĉio, kiu ŝajne faras « sekura » nian vojon.

« La filo de la homo ne scias kie apogi la kapon »: kaj ni estas absorbe zorgitaj fari nian ekzistadon de Pastroj ĉiam pli sekura kaj kvieta.

Nia lukto estas jam perdita tuj de la deiro, ĉar ni ne estas inklinaj « perdi nian vivon ». Nia ago devus celi al la repacigo kaj al la justeco, ne al la venko: tiel estis por Jesuo Kristo.

Mi klopodas paroli pli konkrete.

Ni estas malsanaj je pastra individuismo: ni aŭskultas paroladojn kaj proponojn pri komunumaj agadoj sed, poste, kiam ni revenas al niaj lokaj seĝoj, ni ne sukcesas preskaŭ plu rigardi trans niaj parokaj limoj.

Ni frontas, akademie, multajn instancojn kaj problemojn sed ne kun sincera kaj bonintenca deziro sindediĉi al la bona kaŭzo.

« Iru tra la tuta mondo », sed ni defendas « nian » regnon hereditan de niaj antaŭuloj ne pensante, ke la Dia regno superas ĉiujn niajn privatajn propraĵojn, tiaj propraĵoj de ni, kun tiel nevenkebla ĵazuzo, defenditaj. Ni restadas nur kun la « niaj », kun tiuj, kiuj nin ĉirkaŭas, kiuj nin se kvas, forgesante, ke ĉiuj kune nur Kriston ni devas sekvi.

Tajdo da personoj restas for de niaj interesoj, tajdo pli kaj pli grandiganta ĉar ankaŭ la « niaj » konstante ĉagrene senkuraĝiĝas pro nia pastra mallaboremo. La singardemo, kiun nur la timo de la risko povas iamaniere pravigi, nin katenas al pozicioj, kiujn kvankam ni sentas jam superitaj, tamen tute ne volas forlasi pro iu submerganta sento de malfido, kiu iomete ĉiujn invadas.

Jam de kelk-tempe en nia pastra medio serpentumas ia forta malkontenteco okaziganta kritikojn kontraŭ niaj gvidantoj kaj niaj kunfratoj. Ni estas ĉiuj konvinkitaj, ke la aferoj ne bone marŝas, ni ofte interparolas pri tio, sed poste ĉiu fortiriĝas klopodante suprenaĝi kiel eble plej kontentige.

La Pastra Ofico, komisiita al ni de Kristo, estas sencoriĉa nur tiam se ĝi estas travivata kune, alimaniere oni kuraĝe fortiriĝu ne kiel fuĝo, sed kiel esplorado de aŭtentikaj respondo kaj vivo.

Ne temas pri spritaĵo: ni renoncis reinventi nian manieron prezentiĝi kiel sacerdotoj, nin kontentigante per la plenumado de niaj heĵmaj aferoj kaj renoncante al iu ajn inventema stimulo.

La pacienco, tiel ofte de ni alvokata, nin devigas akcepti daŭrajn kompromisojn. Eble finfine jen la tempo por komenci malkaŝe interparoli por ke denove ni estu kredindaj.

Ĉi-miaj pensoj povas ne valori por ĉiuj: por mi ili estas profunde realaj. Se iu ajn konigos al mi siajn opiniojn pri tiu temo, mi estos al li sincere dankema.

Don Gianni — Mantova

(esperantigis Prof. N. Dell'Aringa)

LINGVA ANGULETO

Jezuo aŭ Jesuo?

Al iuj samideanoj, kiuj timas ŝanĝojn de la lingva fundamento, W. Mu-drak donas klarigon rilate la nomon de Kristo.

- 1) Neniu intencas ŝanĝi la Zamenhofan fundamenton;
- 2) Dum la IKUE-Kongreso en Munkeno mi fiksis tekstojn de niaj komunaj preĝoj. Oni decidis skribi JESUO, ne JEZUO.
- 3) La kialon ni alportas el la hebrea deveno de la vorto mem, ĉar la ori-

ginala vorto Jeoshua, kiun la grekoj tradukis IHSSOUS kaj la latinoj IESUS, ŝajnas al ni enteni ne la z (milda), sed la « s » aŭ « ŝ ».

La redaktoro, kiu lernis la hebrean gramatikon kaj instruis dum 20 jaroj la grekan lingvon, konsentas kun sam-ano Mudrak.

La greka litero « H » sonas kiel longa « e » aŭ « ee » en la germana vorto Meer; « ou » sonas kiel « u »; « s » = « s », ne « z ».

Rivelo aŭ revelacio?

Mi havas du kat. terminaretojn (Deutsch-Esperanto kaj Esperanto-latine): ambaŭ metas « dia rivelo ». Sed la « Plena Vortaro » kaj mia itala vortareto metas « revelacio ». Kion vi pensas?

MORTIS LA PATRIARKO DE LA EKUMENA ORTODOKSA MOVADO: ATENAGORO

La 7.an de Julio mortis la patriarko de Kostantinopolo, Atenagoro, la 268.a posteulo de la Apostolo Sankta Andreo.

Li naskiĝis antaŭ 86 jaroj kaj fariĝis, tre juna, monaho. 37 jaraĝa li estis elektita episkopo de Korfuio sed post iom da tempo li vojaĝis al la Ameriko, kie li estis elektita ortodoksa episkopo de la Norda — kaj Suda Amerikoj.

Li diziris renkontiĝi kun la Papo Johano XXIII° sed la afero ne estis ebla. Li sukcesis renkontiĝi kun Paŭlo VI° en Jeruzalemo, la 5.an de Januaro 1964.a, kaj en Kostantinopolo la 25.an de Julio 1967.a, kaj, fine, en la sama jaro, en Romo. La okcidenta kaj la orienta patriarkoj, Paŭlo VI° kaj Atenagoro, marŝis kune survoje al ekumenismo. Ili forŝovis la anatemojn, kiujn reciproke, antaŭ multe da jarcentoj, oni ĵetegis la unu kontraŭ la alian. La Papo redonis al la greka urbo de Patraso la kapon de la sankta Apostolo Andreo, kiun la katolikoj forprenis dum la XVI° jarcento. La biblia kaj majesta figuro de la patriarko Atenagoro ne estas facile forgesbla. Lia vojo estas daŭrigenda. L. F.



LA PARABOLO PRI LA KAMELO

Tiu ĉi paroleto apartenas al la sinoptika tradicio (vidu Mt 19: 23-26; Mk 10: 23-27; Lk 18: 24-27). Ĝi proponiĝas laŭ la maniero ofte paradksa, kelkfoje ŝerca, kiel e-suo parolis al siaj aŭskultantoj. La bildo devas impresi la imago-povon kaj fiksiĝi en la memoro tiamaniere ke la instruo povas daŭri. Vidu: « ... *Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio!* ».

Jesuo emis, ŝajnas, paroli pri tiu malgracia servobesto, kiu restas kiel la vivanta simbolo de la antikva nomadinta Izraelo. Memoru ankaŭ la atakparolojn de Jesuo al la skribistoj kaj fariseoj. « Ve al vi, blindaj gvidantoj, kiuj elkribras la kulon kaj glutas la kamelon! » (Mt 23: 24). En ĉi tiu kazo, Jesuo verŝajne vortludis per « kulo » kaj « kamelo », vortoj kiuj similas en la Arama lingvo. Vortludoj kaj paradoksaj komparoj estis kutimaj instrumanieroj de la rabenoj.

Do ne necesas supozi — kvankam oni povas kelkfoje trovi tiun ĉi hipotezon eĉ presitan — la ekziston de ia malgranda pordo, kies nomo estus « trueto-de-kudrilo ». Tiu tute senbaza teorio devenas de la nekonado de orienta pensmaniero.

Klara estas la instruo de Jesuo. La homo, kiu serĉas sian savon per kreskado de riĉaĵoj (t.e. por kiu

mono estas la ultima celo), estas tiel mokinda kiel la nomado, kiu volus tiri kamelon tra trueton de kudrilo. Do la unua celo de Jesuo: ridindigi la riĉulon, kiun ni kutimas admiri, respekti kaj imiti. Ĉu oni ne devas senĉese demistifiki riĉon kaj riĉulojn?

Ĉar riĉuloj ne nur estas ridindaj, sed ili kuras al sia pereco. Dua celo de Jesuo. La homa komedio estas vere tragikomedio. Vidu la similan parabolon pri la senprudenta riĉulo (Lk 12: 16-21), kiu amasigis multajn riĉaĵojn, kaj diras al sia animo: « Animo, vi havas multajn posedaĵojn, provizojn por multaj jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja ». Sed Dio diris al li: « Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton oni postulas de vi vian animon. Kies estos, kion vi preparis? ».

Oni devos ĉion forlasi, ĉion, t.e. ĉiun posedaĵon, kiu ne estas rila te Dion.

Do niaj posedaĵoj devas servi al ĉiuj niaj gefratoj, servi al la konstruo de la regno de Dio... Mono estas nur ilo. Sed granda estas la danĝero fari ilon absolutaĵo.

Ĉu ni povas diri, ke tiu danĝero forestas el nia « konsumado-socio »? Certe ne! Do ni medidu la parolon de Jesuo: « Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉaĵojn, eniros en la regnon de Dio! ».

Gérard-Henry Baudry

ROSA LENTI

« Mamma Rosa » (Patrino Rosa): multaj ŝin nomas tiamaniere, miloj kaj miloj, kaj ĉiuj estas malliberuloj aŭ eksmalliberuloj. Rosa Lenti, 74jara, sin dediĉas, ekde la jaro 1926a, al la zorgo, al la morala kaj materia helpo de la liberigitoj. « Ĝuste en tiu jaro — ŝi klarigas — mia edzo estis erare arestita kiel partopreninto en la atenco, kiu okazis ĉi tie en Bologna, kontraŭ Mussolini. Li restis en malliberejo, senkulpa, du jarojn. Fine li estis liberigita. Dum tiuj longaj du jaroj mi bone kaptis la senton de malespero, de forlaso, de indiferenteco travivataj de multaj malliberuloj, kaj konstatis kiel klopodiga estis por mia edzo liberigita, trovi laboron. Tiam mi firme decidis dediĉi ĉiajn miajn energiojn, ĝis la fino de mia vivo, al la helpo de tiuj fratoj, kiuj malgraŭ iliaj kulpoj, arde deziras reeniri, honeste kaj plenrajte, en la socion, en la familion ».

Rosa Lenti tute plenumis sian promeson. Dum ĉi tiuj 45 jaroj ŝi skribis al miloj da malliberuloj, vizitis ilin, havigis al 7 punlaboruloj la « gracon ». Ŝia domo en Bologna, Vicolo dell'Orto, 3 estas ĉiamdaŭre malfermita al ĉiuj malliberuloj. Mamma Rosa gastigis centojn kaj centojn da ili kaj nutris kaj vestis ilin; plie, al multaj inter ili, ŝi trovis ankaŭ laboron, havigis repaciĝon kun la familianoj. Rosa Lenti gastigis ankaŭ malliberulojn elirintajn el kriminalaj frenezulejoj. Ŝi senĉese faris tion, sen iu ajn timo, eĉ post la morto de ŝia edzo okazinta en 1953a.

Certe ne mankis al ŝi danĝeraj situacioj. Iuj eĉ ŝtelis ĉe Mamma Rosa kaj frenezulo mortminacis ŝin. Ŝi bravege daŭre iris sian vojon, ĉion foroferante, vendante meblojn kaj pentraĵojn tutintence helpi siajn « perditajn ŝafinojn ».

« Sed mi ĝuis ankaŭ multajn kontentigojn » asertas Sinjorino Lenti, « leterojn plenplenajn je amo kaj dankemo flanke de miaj helpitoj, karajn leterojn, kiujn mi ĵaluze konservas ».

LINGVA ANGULO

Lernu ni per eraroj

En la decembra numero de E.K. (p. 147) troviĝas la frazo: « Mi alparolas vin kiel prezidanto de IKUE, kiel homo kun eblecoj kaj respondeco ». Tiu ĉi frazo havas tute alian sencon ol la skribinto intencis. La skribinto ne estas prezidanto de IKUE, sed li (subjekto) alparolas la prezidanton de IKUE (objekton). La frazo devus soni: « Mi alparolas **vin kiel prezidanton...**, **kie! homon** kun eblecoj kaj respondeco ». La vortoj: **kiel prezidanto... kiel homo...** ne estas predikato sed objekto en la frazo. Akuzativan finaĵon ĉi tie postulas ankaŭ la prepozicio **kiel**.

En frazoj kun verboj kiuj montras iun efekton, produkton aŭ estimon (kredi, opinii, estimi, deziri, nomi, elekti, fari, kaj simila) la objekto havas predikativan sencon kaj staras en nominativo. Ekzemple: « Oni elektis lin prezidanto », tio signifas: ke li **estu prezidanto**. Tamen, se oni uzas la prepozicion « kiel », tiam la frazo ĝuste sonas tiel: « Oni elektis lin kiel prezidanton ».

9.II.1972

P. L. Kiŝ

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

FINANCA RAPORTO PRI LA IKUE-KASO POR LA JARO 1971

Svisaj frankoj

	<i>Enspezoj</i>	<i>Elspezoj</i>
Saldo 1.1.71		167.—
Kotizoj	10 364.20	
EK presado kaj afrankado		8 423.—
Administrado		369.70
Fonduso « Nepagipovaj membroj »	15.35	
Kongreso 1972		15.55
Donacoj	978.61	
Interzoj de la biloj	269.95	
Diversaĵoj	187.80	66.66
	<hr/>	<hr/>
	11 815.91	9 041.91
Saldo		2 774.—
	<hr/>	<hr/>
	11 815.91	11 815.91

Posedaĵo 31.12.71

Banka konto kuranta (= saldo)	2 775.—
Ŝparlibro no. 36493 (St. Gallen)	99.—
Belgaj obligacioj (St. Gallen)	4 397.15
	<hr/>
	7 270.15

Komparo de la posedaĵoj

Posedaĵo 31.12.1971	7 270.15
Posedaĵo 31.12.1970	5 678.20
	<hr/>

Pliiĝo 1 591.95

Emmenbrücke, la 15-an de febr. 71, la kasisto de IKUE

P. Scherer

Raporto de la koskontrolantoj

Ni kontrolis plurajn erojn de la librotenado, komparante la pruvilojn kun la kontolibro kaj la banaj eltiroj. Ĉio troviĝas en bona ordo. Same la sumoj de la biloj estas ĝuste transskribitaj en la bilancon.

*Marlise Wandeler
Alois Stadelmann
Hansruedi Bucheli*